

# La Esperanto-Gironde Informilo



Julio 2018

N° 155



Louise LEVREULT  
20an de februaro 1926 –  
21an de aprilo 2018

*Forpasis en aprilo du  
pilieroj de nia asocio.  
Jen aparta funebra  
numero de LEGI*



Laura VIEILLEFOND  
1917 –  
1an de aprilo 2018



Ce cimetière, près de la tombe de sa mère, Oliva, est sans doute le lieu le plus adéquat aujourd'hui pour dire, sa famille, ses amis rassemblés, notre attachement à Louissette, qui fut, non seulement une mère, la nôtre, l'unique mère, mais aussi *la* mère en son essentielle, universelle figure.

C'est peut-être d'avoir très tôt perdu son père, puis dû donner des soins à celui qui, pour elle, s'était substitué à celui-ci, qu'elle appelait son « oncle », que lui vint une forme de vocation qui l'a portée à, inlassablement, aider, soutenir, puis soigner et accompagner, l'heure venue, sa propre mère, ses beaux-parents, son mari Roland, son gendre, ceux de sa famille, certes, et au-delà d'elle ses proches, ses voisins, ses amis où qu'ils fussent.

En effet, très vite, Louissette qui était d'une terre, ce petit périmètre du Nord Gironde, entre Cubnezais et Marsas, puis Saint-André dont elle ne s'est guère éloignée, a élargi, au contact de Roland, son monde à la terre entière, à vélo d'abord – en sa maison de retraite, quand ses jambes ne la portaient plus, elle rappelait avec un ferme sourire que ces jambes-là avaient pédalé plus de sept mille kilomètres, et elle ne comptait pas la distance parcourue en allant faire ses courses au marché – puis en auto, en avion, et enfin par la langue.

L'espéranto était devenu sa deuxième langue, avec laquelle, elle qui a interrompu tôt ses études et ne parlait pas un mot d'anglais, a pu entretenir des relations étroites et affectueuses avec des personnes de tous pays et de toutes langues, Hollandais, Allemands, Anglais, Bulgares, Russes Macédoniens. Appris par simple imprégnation auprès de Roland, elle fut ensuite assidue au cours d'espéranto dispensé localement, puis, comme il seyait à son tempérament, elle alphabétisa à son tour le kinésithérapeute curieux qui la visitait en sa maison de retraite. Ainsi répondait-elle au mot d'ordre qui fait le titre d'un petit recueil posthume d'articles de Roland, en espéranto, bien sûr, « *Assez de paroles, des actes* ». Mais elle avait à sa façon accéléré cet ambitieux programme, en faisant l'économie des paroles. Pour elle, les actes venaient immédiatement, sans le détour du discours. Avec une autorité naturelle qui prenait forme de détermination souriante à laquelle il était impossible de résister. La truelle à la main, ou l'aiguille à coudre, ou le mot consolateur et par-dessus tout la présence, toujours, partout. Ce qui pourrait apparaître comme relevant d'un sens aigu

du devoir n'était en vérité que l'expression d'une nature spontanément généreuse.

Il semblerait que s'esquisse le pays connu que désignent les trois vertus dites théologiques. Mais la foi qui les soutient, Louissette la tenait entièrement de ce monde-ci. Et c'est vers ce monde-ci, cette terre élargie à la planète entière, qu'elle dirigeait ce qui tenait lieu d'amour et d'espérance. Ainsi a-t-elle, sa vie durant, incarné ce qu'il faudrait appeler des vertus « géologiques », ou mieux « écologiques » parce qu'elle avait fait, simplement, de la Terre sa maison, et dirigé son amour vers ses habitants, sans distinction qui, ensemble, composent la Terre des Hommes. En mère, qu'elle ne cessera jamais d'être. Pas plus aujourd'hui que jamais, parce qu'empreinte en nous, cette mère-ci est éternelle.

*Philippe Levreaud – filo de Louissette kaj Rolando*



*En St André de Cubzac*

Karaj,

Ni konservos karmemorajn sentojn al Louissette, kiu akceptis kaj konsilis nin tiel afable dum jaroj,  
Malgajajn kondolencojn

*Mari-elen'*



*Ĉe Speranza en 2009*

Pri nia amikino Louissette.

Mi konatiĝis kun Louissette en la jaroj 80 kiam mi veturis kun ŝia edzo Rolando al Cenon Palmer por ĉeesti la monatan kunvenon de nia E-asocio. En tiu tempo, ŝi multe sciis pri Esperanto; ŝi havis okazojn renkonti esperantistojn pere de esperantistaj aranĝoj, naciaj kongresoj – al kiuj, kelkfoje, antaŭe, ili iris bicikle!

- sed la internacia lingvo estis ĉefe la afero de la edzo, famkonata en la franca movado. Louissette havis aliajn zorgojn kun sia maljuna patrino kiu vivis en ŝia hejmo.

Kiam Rolando forpasis, bedaŭrinde tro frue, Louissette ricevis multajn korvarmajn mesaĝojn kaj ĉefe el la esperantistaro el tuta Francio; kaj eĉ el eksterlando. Tiuj amikaĵoj multe kortuŝis ŝin kaj de tiam ŝi decidis aktive partopreni en la Esperanto-movadovivo. Ŝi eklernis la lingvon, kaj rapide ekinstruis ĝin en St-André de Cubzac, kadre de la asocio AOL (asocio por laikaj agadoj cele al popola edukado). Samtempe, ŝi regule partoprenis en la vivo de Espéranto-Gironde kaj ĉeestis ĉiujn kunvenojn.

En 2006, kune kun la asocio AOL en kiu, dum multaj jaroj, la paro ludis gravan rolon, ni festis la 80an datrevenon de Louissette en ŝia urbeto. Poste, ŝi daŭrigis viziti la cenonan kurson ĝis kiam ŝiaj fizikaj fortoj tion ne plu permesis.

En mia memoro, Louissette restos kiel laborema kaj modesta amikino kun fortaj laikaj konviktoj; ankaŭ kiel ekologiemulino, kiu ŝatis la simplan kamparan vivon.

*Joël*

☆☆☆

Voilà nos quelques lignes en l'honneur de Louise...

Nous avons connu Louise en nous rapprochant d'Espéranto-Gironde au début des années 90. Dès notre 2ème rencontre je lui ai déclaré qu'elle était mon coup de foudre amical. Nous l'avons rebaptisée Mamie Loulou. Avec les stages d'Artigues les occasions étaient multiples de voir Louise qui nous hébergeait dans sa maison de St-André de Cubzac. Nous l'avons accueillie aussi à Périgueux quand elle m'amenait des correspondantes que je présentais à mes petits élèves espérantistes du collège Montaigne. Elle n'a manqué aucun de nos rallyes d'Eo 24. Quand nous préparions des spectacles musicaux elle était là aussi. Depuis son entrée en maison de retraite, nous nous téléphonions souvent. La dernière fois c'était le 20 février dernier pour son 92ème anniversaire.

Sa gentillesse et sa bienveillance resteront dans notre mémoire.

*Brigitte et Thierry Faverial*



Tre malĝojiga novaĵo.

Mi diskonigis ĝin sur la muro "Ni funebras" de Facebook surbaze de ciaj informoj :

Sabaton 21an de aprilo 2018 forpasis Louise Roland Levreaud, edzino de Roland Levreaud.

Kelkaj ĝirondiaj esperantistoj akompanis la familion por ŝia entombigo en St-André-de-Cubzac.

Certe Roland trovis en ŝi tre valoran subtenon kaj konsilojn por la grava laboro, kiun li faris por Esperanto.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Roland\\_Levreaud](https://eo.wikipedia.org/wiki/Roland_Levreaud)

Amike.

*Henriko Masson*



## LOUISETTE

En la jaro 1995 dum staĝo en Artigues, Louisee petis de mi gvidi kurson en St André de Cubzac. Tion mi faris dum kelkaj monatoj. De tiu tempo ni amikiĝis kaj ofte retrovis nin en diversaj okazoj. Ŝia granda domo akceptis min en varma etoso kaj ni pasigis agrablajn momentojn. Mi ĉiufoje vagis en la ĝardeno ĉiam plenplena de floroj, plantoj, arbustoj, arboj. Estis spiro meze de konstruaĵoj.



*En Aŭgsburgo en 1997*

Ni kune veturis al diversaj eventoj, kongresoj, ĉu aŭte, ĉu trajne, eĉ aviadile ĝis Aŭgsburgo por la SAT-kongreso de 1997, kie vojaĝis kun ni Danièle. Ni triope ĝuis tre belan renkonton, kiun ni plilongigis per vizito de Munich dum pluraj tagoj. Estis por mi neforgesebla vivmomento.

Louisee estis tre lerta per siaj manoj, kiuj sciis pretigi tiom da belaj kaj simplaj aĵoj. Ĉu per brodado, ĉu per arbofolioj, birdoplumoj, florpetaĵoj. Mi konservas arte plektitan lavendtigojn kun ankoraŭ odorantaj floroj, kaj bukedetojn de violoj ŝi neniam forgesis donaci al mi por mia datreveno (ni naskiĝis la saman monaton).

Mi ankaŭ memoras pri ŝia 80a datreveno festita en St André de Cubzac, same pri la inaŭguro de Aleo Esperanto en la sama urbo.

Ŝia ĉambro, en la maljunulejo kie ŝi vivis dum siaj du lastaj jaroj, ŝajnis muzeo, tiom multaj videblis familifotoj, pentraĵoj, brodaĵoj, memoraĵoj de ŝiaj multnombraj vojaĝoj. Kaj ŝi ĉiam havis anekdoton por rakonti, ĉar ŝi konservis bonan memoron.

Ĝis revido, Louisee,

*Monique*

*Al Louise*

*El ciaj helbluaj okuloj  
Ĉerpas mi jen fontojn  
Inspirajn por ondaj marluloj,  
Novaj horizontoj.*

*El cia frandema liparo  
Ridas melodioj  
Elvokaj por kampa nektaro,  
Floraj rapsodioj.*



*Marcelo* Ste Sévère 2004 kun Leo kaj Monique



Louise,

Neniam mi havis la eblecon diri al vi, kiom da plezuro mi sentis, kiam mi renkontis vin. Ĉiam afabla, rideta, parolanta al ĉiuj. Dum longa tempo vi estis grava membro de Espéranto-Gironde.

La lasta fojo, kiam mi vizitis vin, estis en retirigeo, en kiu vi akceptis min kaj akompanis min ĝis alia ĉambro por prezenti al mi najbarinon, kiu deziris paroli pri Esperanto.

Mi konservis bonan memoraĵon de vi precipe de viaj ridetoj lumigantaj viajn blujajn okulojn.

Ripozu pace Louise,

*Gloria*



*En Sanguinet en 1996*

Kiam mi memoras pri Louissette, mi unue vidas rideton, kiu lumigas ŝiajn brilajn okulojn. Sed mi memoras ankaŭ ŝiajn ĉapelojn. Louissette ĉiam alvenis surhavante ĉapelon. Ŝi havis diversajn modelojn, kaj elektis laŭ la vetero, jen kontraŭ frosto, jen kontraŭ suno, aŭ el lano, aŭ el pajlo ... Ĉiuj estis modestaj, kiel ŝi mem sed ŝi bezonis protekti sin per ĉapelo.

Louissette ĉeestis ĉiujn kunvenojn de nia loka asocio Esperanto-Gironde, kiujn ŝi senmanke vizitis, ĝis kiam tro suferigaj sanproblemoj malebligis al ŝi plu iri.

Louissette montris sin afabla, serena, ridema, nature helpema kaj gas-tema sed ankaŭ kapablis esti decidema, kiam necesis.

Pro riĉoplenaj travivaĵoj kun sia edzo Rolando, ŝi konservis multajn anekdotojn kaj rilatojn kun diverlandaj esperantistoj, kun kiuj ŝi regule perle-tere intersanĝis. Foje ŝi rakontis anekdotojn, tre simple, sen iu ajn fanfa-ronaĵo. Ŝi ŝatis babili kun la aliaj. Aŭdante ŝin, ni komprenis, ke ŝia vivo ne ĉiam glatis sed ŝi neniam plendis. Estis tiel.

Louissette havis grandan domon, plena je memoraĵoj. Multnombraj li-broj –heredaĵo de Rolando- plenigis tutan bibliotekon. Troviĝis ankaŭ orna-maĵoj, memfaritaj de Louissette, kiu kapablis arte glui diversajn materialojn por pretigi proprajn kreaĵojn. Ŝi ankaŭ tre lerte kudris.

Kiam ni vizitis ŝin, ni promenis kun ŝi en ŝia gardeno, kie belaj floroj kaj arbustoj ĉiam plezurigis nin.

Ŝi ŝatis sian ĝardenon, kiun ŝi dorlotis, ĝis kiam fortoj mankis.

Ŝi ŝatis sian grundon.

Ŝi ŝatis tutsimplan vivon.

Bonkora Louissette, ne eblos forgesi cin.

*Klodin'*



*Kun Ŝeline kaj Mikaelo  
en Carbon-Blanc en  
2007*



## SAINT-ANDRÉ-DE-CUBZAC

# Le palais de l'ONU

Comme trente autres familles du canton, Louise Levréaud accueille depuis une dizaine d'années les artistes qui se produisent l'été au château Robillard. Echanges culturels festifs



Louise Levréaud entourée de trois danseuses du groupe de Carélie qui devait se produire mercredi soir à la salle du champ de foire (Photo Guy Lacquement)

GUY LACQUEMENT

**C**hez nous, c'est une maison ouverte, lance, non sans une légitime satisfaction, Louise Levréaud. « Rien avant que le CLAP (\*) n'accueille des groupes folkloriques à domicile, mon défunt mari et moi accueillions des étrangers dans notre maison. Nous recevions régulièrement des Espérantistes de toute l'Europe depuis 1946. Aujourd'hui cette langue vit une seconde jeunesse par le biais d'Internet. »

« Nous voulons connaître ce qui se fait chez les autres. Nous voulons accueillir. » D'abord installés à La Teste, les Levréaud n'ont pas eu de mal à se faire accepter à Saint-André-de-Cubzac. « Vous savez, ce sont toujours les mêmes qui font quelque chose » se souvient Louise. Elle fait allusion à l'AOL (association des œuvres laïques) dont elle est membre et aux différentes associations locales.

« Il y a huit ans, nous avions des Russes. J'ai eu la chance de jouer le choeur. C'était formidable ! Nous avons eu droit à un concert privé. Visiblement ces gens ne pouvaient pas s'empêcher de chanter. Nous sommes restés longtemps en relations épistolaires... »

M<sup>me</sup> Levréaud visionne volontiers la cassette vidéo du spectacle des Tébèques venus après les Russes et les Bulgares profiter de son hospitalité. « Les Mexicains

avaient oublié je ne sais quoi chez nous. Nous les avons rejoint à Montlieu et nous avons reçu des cartes postales de chaque étape de leur longue tournée en Europe. »

Dès lors la préparation des chambres et la confection des repas posent moins lourd.

« On ne se fatigue pas quand on travaille pas plaisir. En plus, mon amie, Anne-Marie donne un sérieux coup de main » confie l'espérantiste.

Chaque été elle est frappée par la bonne volonté, la discipline et le professionnalisme de ses hôtes.

« Ils ont le désir de plaire. » Comme si chaque groupe folklorique se considérait comme l'ambassadeur de l'amitié entre les peuples. Un chapitre dans lequel Louise n'a rien à leur envier.

(\*) CLAP : Culture, Loisirs, Animation, programmation. Association qui organise la programmation culturelle dans le canton de Saint-André en relation avec les collectivités locales et FIDDAC

## Trente familles

Depuis une dizaine d'années, le CLAP (Culture, loisirs, animation, programmation) regroupe une trentaine de familles du canton susceptibles de recevoir à domicile les artistes qui se produisent l'été à Saint-André-de-Cubzac.

Les habitants offrent l'hébergement pour une ou deux nuits aux groupes folkloriques internationaux ou aux acteurs français. Dans les chambres dispo-

nibles des maisons particulières sont accueillis jusqu'à sept personnes, selon les demeures.

A charge pour le CLAP et la troupe invitée de répartir les artistes au mieux de leurs affinités, dans ces chambres d'hôtes d'une nuit.

Les Cubzagais s'engagent également à servir, également à leurs frais, un repas à domicile et un casse-croûte pour la route du retour.

**Louissette** post la forpaso de Rolando diligente vizitis esperantokursojn. Ĝis tiam ŝi simple lernis dank'al kontaktoj kun parolantoj. Ĉar ŝi ja dekomence fidele postsekvis sian edzon ĉien ajn por SAT- aŭ SAT-Amikaraj kongresoj, diverslokaj prelegoj, kaj kompreneble ankaŭ lokaj renkotiĝoj.

Admirinde, kiel tiu virino kun malfacila infanaĝo, dediĉis sian tutan vivon por akompani, flegi, zorgadi alies, famililanajn aŭ ne, malkomfortojn, malsanojn, eĉ vivfinon.

Tre praktika homo, Louissette per serena sed firma decidpovo kapablis trakti kun metiistoj, marĉandi kun makleristoj, klare montri sian obstinon, por eviti trompojn kaj solvi iujn ajn problemojn. Eterne milda sed senkomplezema, konvikita, ŝi sekvis siajn humanismajn idealojn, tiujn de SAT, al kiuj Rolando kaj ŝi ligiĝis jam antaŭ la dua mondmilito...

Dankon Louissette pro tiu ekzempla vivo inter ni.

Post la forpaso de Rolando, en 1992, Louissette esprimis eternan dankemon pro la organizado de la samjara SAT-Amikara Kongreso en Artigo. Kaj kia kongreso! Jam tro malsana por vojaĝi, ROL tiam lastfoje aperis inter siaj amikoj. Kiel knabo, mi rigardis lin kiel netuŝeblan. Gaita, mia E-patrino, eble kulpas pri tio, ĉar ankaŭ ŝi mem senlime admiris lin. Profunde kortuŝite pro lia forpaso, mi longe ne povis verki eĉ linion pri li. Nur post pli ol trijara kovado rezultis dediĉo per kreado de la teatraĵo *La Komuno, kantante!* ludita de La Kompanoj en 1997. Same malfacilas hodiaŭ verki pri Louissette. De pli ol du monatoj mi ne sukcesis alfronti la ĉagrenon, kiu larmigas min nun plu. Post Henriette Chaillot, Odile Badet, Marcelle Courbin, Yvonne Sevilla kaj Sabine Ardouin, post precipe Gaita Robert, Simonne Bernard kaj Ŝelin' Demontoux, Laŭra Vieillefond kaj Louissette konkludas la liston de la virinoj el nia loka esperantista grupo, pli malpli samaĝaj kiel miaj propraj avinoj, kiuj akceptis min kiel knabon, helpis min evolui kiel adoleskanton, malfermante sian koron, por ke mi malfermu la mian al la mondo. Poste, kiam mia vivo ŝanceliĝis, ili restis necesa apogo. Sed kompreneble ili ankaŭ kunfestis multnombrajn eventojn, kunĝuis belajn tempojn, malkovrojn kaj sukcesojn. Rememori iliajn ridetantajn vizaĝojn aŭ rigardi ilin sur fotoj pluvivigas ĉiujn tiujn neforgesindulinojn.

Mi ne povas disigi Louissette de Rolando. Mi ankaŭ ne kapablas disigi ŝin de tiu generacio, kiu hodiaŭ forlasis la vivon sed postlasis al ni vivekzemplojn, -konvinkojn, -idealajn. Mi ne pretas forgesi ilin. Mi ne forgesos Louissette.

*Marcelo*

## El SENNACIULO—junio 2018

La 1an de aprilo 2018, prizorgata en la hejmo de sia filino en tenera etoso, pace forpasis dum sia dormo, kiel ŝi deziris, k-dino Laura Vieillefond (33049). Ŝi estis 101-jaraĝa.

Ŝi esperantiĝis fine de la 70-aj jaroj kaj ekde tiam arde agadis por Esperanto. En la jaro 1980 ŝi iniciatis du kursojn en sia loĝurbo Sainte-Foy-la-Grande, unu por plenkreskuloj, kaj alia por duagradaj lernejoj. En 1984, ŝi partoprenis la SAT-kongreson en Bordojo, kaj aliĝis al SAT. La kotizon ŝi pagis ĝis la jaro 2016. Ekde 1988, ŝi fariĝis prezidantino, dum pli ol dek jaroj, de loka Esperanto-asocio, kiu en 1991 kapablis okazigi Zamenhof-tagon kun 57 partoprenantoj, kaj plurfoje gasitigis kunvenojn de la najbara Esperanto-Gironde. Inter siaj eksterlandaj korespondantoj ŝi foje varbis prelegontojn, kiam tiuj ĉi vizitis ŝin.

*Laŭ informoj de Marielen Désert kaj el la broŝuro "De Laborista Esperanto-Grupo al Espéranto-Gironde", kompilita de Léo Robert, 1998.*



## GRAND ORIENT DE FRANCE

## Abattre les murs

Philippe Foussier, Grand Maître du Grand Orient de France depuis août dernier, était à Sainte-Foy-la-Grande la semaine dernière afin de saluer l'entrée de Laura Vieillefond dans la Loge Travail et Progrès.

Béatrice FERRER

Philippe Foussier, président du Conseil de l'Ordre du Grand Orient de France, était à Sainte-Foy-la-Grande la semaine dernière, sa première visite en Gironde depuis son élection, pour saluer l'entrée dans la Loge Travail et Progrès<sup>12</sup> d'une nouvelle sœur, Laura Vieillefond qui, centenaire, rejoint son mari Pierre et conserve la double appartenance avec sa Loge bergéroise d'obédience mixte du Droit Humain. Née à Cleveland en 1917, Laura est arrivée à Sainte-Foy-la-Grande dans les années vingt avec ses parents. Son nom de jeune fille est Sapoznik, son père était né à Vilnius. Laura Vieillefond a marqué le Pays foyen et tous ceux qui l'ont rencontrée de l'empreinte de sa volonté, sa pugnacité, son enthousiasme à défendre les causes



Laura Vieillefond en 1943  
(Collection particulière Vieillefond)



Témoin engagé  
Laura Vieillefond  
la volonté de  
les causes qui lui s

qui lui semblaient justes. Solidarité, entraide, universalité, éducation populaire... avec toujours un peu d'avance sur quelques grands sujets de société et une volonté inébranlable, Laura Vieillefond<sup>13</sup> a défendu la méthode Freinet dans l'enseignement, l'écologie quand personne n'en parlait, les énergies renouvelables au début des années soixante, et la grande affaire de sa vie reste l'Espéranto, cette langue universelle qu'elle a contribué à promouvoir dans toutes les écoles du Pays Foyen et bien au-delà.

### Altruisme

Philippe Foussier : « Nous sommes très heureux d'accueillir cette femme au parcours exceptionnel, une vie consacrée au service

des autres, faite d'altruisme, de solidarité. » Le Grand Orient de France a été élu en août et pour la première fois volontiers à l'initiative de la Loge témoin d'un siècle qui a commencé le 1<sup>er</sup> septembre 1740. Il rappelle l'année de célébration de la naissance de la maçonnerie, un siècle où il s'agissait d'ouvrir le dialogue entre les hommes, où les hommes se réunissaient par leur statut, leurs origines se relâchaient, un dialogue et un échange. « Ce message, notre ambition, notre volonté de vivre cette fraternité, nous la devons à Laura Vieillefond ».

## entre les hommes



du siècle passé  
a gardé intacte  
faire avancer  
semblaient justes.



**Philippe Foussier, Grand Maître, président du Conseil de l'Ordre qui rassemble 55 000 adhérents, entouré de Xavier Chabois-Chouvel, 2<sup>e</sup> Grand Maître Adjoint et de Franck Chabot-Mercier conseiller.**

de générosité,  
solidarité et d'en-  
Maitre du GODF  
un an a répondu  
tation de cette  
e tradition ma-  
origines remon-  
pelle dans cette  
ion du tricente-  
nerie moderne,  
battre les murs  
s. « Un endroit  
parés à l'exté-  
ut, leur métier,  
trouvaient pour  
échange entre  
sage reste mo-  
tion est de faire  
sité ». Cet hom-  
lefond rappelle

que l'obédience a ouvert sa porte aux femmes en 2011 seulement. « Mais en 6 ans, 2 500 sœurs ont été accueillies dans 600 loges ». Cette fraternité rassemble beaucoup de courants d'opinion mais compte toujours deux ennemis : l'idéologie d'extrême-droite et l'intégrisme religieux. « Nous sommes des républicains ardents, pour une république indivisible, laïque, démocratique et sociale ».

(1) Travail & Progrès est l'héritière d'une des plus anciennes Loges adhérente de la Fédération du Grand Orient de

France. Ses origines remontent à 1747, soit au tout début de la franc-maçonnerie en France. Elle est aussi l'une des quelques-unes de Gironde à accueillir des femmes dans ses rangs.

2) On peut découvrir Laura Vieillefond, ses combats, sa formidable énergie, dans un film réalisé par Christian Auckenthaler dans la série « Passeurs de mémoire », une commande de la communauté de communes du Pays Foyen. [https://www.youtube.com/watch?v=lu\\_RfoBBu\\_0](https://www.youtube.com/watch?v=lu_RfoBBu_0)

Mais aussi dans un article que M-C Boisseleau lui consacre disponible en ligne sur le site de la Société historique des Amis de Sainte-Foy.

## EKSTERORDINARA LAŬRA!

*Vibra omaĝo de Mari-elen' al Laŭra, legita okaze de ties entombigo en Ste-Foy-la-Grande.*

Hodiaŭ, Bruno Ferré, Monique Dussenty, Emile Mas, Jorgos Comte, Joël Lajus, Christian Auckenthaler, Daniel Jourdain, ŝatus esti ĉi tie. Ili ne povas kaj tion tre bedaŭras, ĉar por ili, Laŭra, vi signifis multon, kiel amikino, kiel bela persono. Jes, vi kiel persono, multon signifas por ili. Tial nome de niaj esperantistaj geamikoj, mi volas diri: dankon. Dankon al vi, Laŭra, por ĉio, kion vi faris en via vivo, por viaj samsortanoj, kaj por nia mondo pli ĝenerale.

Kiam mi ekkonis vin, vi batalis samtempe por Esperanto kaj naturrespekto. Vi parolis pri pedagogio, Freinet ne plu konservis sekretojn por vi. Vi instruis en tiom da lokaj lernejoj!

Pri Esperanto, vi ja estas konata: vi aliĝis ĉiujare al UEA, SAT, SAT-Amikaro, Espéranto-Gironde, kaj regule korespondis kun multaj homoj en la mondo. Kaj vi ja aktivis por diskonigi la lingvon: kiu, en la regiono, deĵorante en komunuma mandato, ne ricevis unu el viaj leteroj por petegi, ke oni malfermu klason por Esperanto!

Pasintjare, vi subite diris: mi jam forgesis la lingvon. Ho, mi vere ŝatus ĝin studi denove. Kiel nomiĝas tiu lernolibro, kiun mi iam uzis? Jen vi do, ĉiam entuziasma por lerni, vekis intereson kaj konstrui ideojn **por** Esperanto kaj **per** Esperanto. Per vojaĝoj kaj per la lingvo ekzemple, vi rendevuis kun via infanaĝo, en Litovio kun via patro kaj en Usono, kie vi naskiĝis. En lernejoj vi provis transdoni al infanoj kiel lerni ion de renkontiĝoj kun aliaj kulturoj, tra tiuj multnombraj leteraj interŝanĝoj, kaj mi bone memoras, kiel vi skribis mane la tradukojn per diversaj koloroj.

Kelkaj el ni perfekte memoras la kunvenojn en konstruaĵo de la strato Langalerie, poste en salono apud la lernejo, kaj en via hejmo, kun Marcela, kaj la karmemoraj Sabine kaj Elsa.

Via ardo vekis foje intereson, foje ridemon, sed vi atentis nek kontraŭargumentojn, nek malestimajn reagojn: vi ja sciis, ke batalon oni gajnas nek ripozante, nek timante, nek pardonpetante pro tio, kio oni estas, sed konstante dediĉante sin al la tasko. Vi ellaboris strategiojn por instigi al uzo de la lingvo en ĉiuj lokoj, kie infanoj lernas, kiel konstrui al si mondobildon.

Vi fakte nutris vian fervoron per rezistemo de viaj kontraŭantoj, kaj ĉiu sukceso estis fieromotivo por vi, vi ĝojis fervore, febre.

Kaj super ĉio, vi estis fidela amikino, pli fidela ol ni, verdire.

Kaj mi ĝojas, ke hodiaŭ, en la tago de tiu adiaŭo, bela vetero sugestas ke via lukto ne estis vana, ke belaj tagoj ankoraŭ estas antaŭ ni, ke viaj ideoj, foje tro fruaj por esti komprenataj, iam triumfos.

*Mari-elen'*



## ***NI SEMAS KAJ SEMAS, NENIAM LACIĜAS...***

Tiu verso de Oĉjo Zaza perfekte spegulas la vivon de Laŭra. Ekde sia esperantiĝo obstine Laŭra informadis ĉiajn publikojn, instruadis ĉiujn bonvolemajn gelernantojn, infanojn en lernejo, adolesktantojn en liceo, plenkreskulojn en klubejo. Tro gurde kelkaj riproĉetis. Tamen firme konvinke ĉar konvinkite.

Fortan energion eligis tiu virineto, anvangarda en pluraj facetoj de sia neordinara vivo. Tion atestas ŝiaj rilatoj al la homaro (ekologiista, pacista, sennacieca esperantistino), al sia profesio (Freinet-pedagogo en la ICEM-esperanta grupo), al siaj engaĝiĝoj kaj konvinkoj (vegetaranismo, framasonismo).

Ja Laŭra restos sekvinda ekzemplo por iu, kiu ne pretas cedi fronte al trudema mondo, al prema kapitalismo; ekzemplo por iu, kiu celas mem pripeni kaj kritiki; ekzemplo por iu, kiu provas fidi en la homaro, humile proponante al ĝi personajn ilojn, rimedojn, cele al harmonia kunvivado, dispartigo de la konoj, de la riĉaĵoj.

Laŭra forte stampis siajn samtempulojn. Ŝi ne hezitis skui ankaŭ la membrojn de Espéranto-Gironde, kiam necesis, per trafaj intervenoj. En Ste-Foy-la-Grande, ŝi sukcese transdonis sian torĉon al Mari-elen'.

Multaj bildoj restas en mia kapo pri Laŭra. La plej frappa certe estas ŝia partopreno en la rokkoncerto de *La Rozmariaj beboj* dum la SAT-Amikara Kongreso en 1992. Tiam ses el « ŝiaj » liceaninoj, al kiuj ŝi pagis la kongreskotizojn, dancigis ŝin kaj eĉ kuŝe flugigis ŝin, plurfoje ĵetante ŝin supren el siaj plektitaj brakoj. Tiam Laŭra, malpeza, radie feliĉis. Ridoj kaj kisoj konkludis la kanzonon de JoMo antaŭ la aplaŭdoj !

Dankon Laŭra !

*Marcelo*



## 102 ans et toujours sur le chantier

Publié le 2 Janvier 2018



Si la fidélité est une valeur importante pour les francs-maçons, Laura Vieillefond, née Sapoznik en est le vivant exemple. Aujourd'hui âgée de 102 ans, cette ancienne institutrice fut membre de la loge *Le lien fraternel* à l'orient de Bergerac (Dordogne) durant une trentaine d'années. Mais alors que, gagnés par l'âge, d'autres ne peuvent faire autrement que de cesser de « maçonner », Laura a décidé de se rapprocher de la loge *Travail et Progrès* du GODF à l'orient de Sainte-Foy-la-Grande (Gironde) qui initie les femmes et affine les sœurs depuis déjà trois ans. Ce rapprochement traduit aussi une proximité de cœur puisque l'époux et « frère » de Laura, Pierre Vieillefond, aligne fièrement ses soixante-dix ans d'appartenance au Grand Orient dont il fut plusieurs fois conseiller de l'ordre. Le 18 octobre 2017, il fallait que cet événement peu ordinaire revête un certain lustre. C'est pourquoi Philippe Fossier, grand maître du GODF est venu au nom de son obédience, donner sa fraternelle accolade à la nouvelle initiée, insistant non seulement sur sa fidélité maçonnique, mais aussi sur l'engagement humaniste dont elle a fait preuve sa vie durant en tant que militante de la pédagogie Freinet et du mouvement espérantiste.

<https://www.fm-mag.fr/article/actualite/102-ans-et-toujours-sur-le-chantier-1651>



*Centjara Laŭra legas sen okulvitroj!*

## EL LA RETEJO DE LA JURNALO *La Dordogne Libre*

### A condolence from Cleveland

I wish to express my deepest thoughts of condolence to Pierre and the family of Laura Vieillefond. Through the outstanding work that Mme Vieillefond did to promote the Esperanto movement, my father and I had the privilege of meeting both Pierre and Laura when they came to visit Cleveland, the city in which Laura was born. I believe it was in 1995. Laura still had the address of the home where she lived as a young child and we drove to the neighborhood only to find the house had been demolished. They stayed in our home for several days and we traveled with them to see Niagara Falls. Our conversations with them showed their concern for the humanistic needs of the world and their beliefs that through a common language, Esperanto, people could make a major improvement in the quality of understanding between different people. In the years after we met Pierre and Laura in Cleveland, we had a few other opportunities to meet them in France. My father spoke highly of Laura and thought highly of the way she promoted the Esperanto movement in France. I am sure all of her family remembers Laura for her many qualities and I know you have many wonderful memories that will help you endure the sadness of her departure. May her memory be a blessing for all. With warmest thoughts and prayers. Ralph Raphael Simon (rraphael@aol.com)

*De Ralph Raphael SIMON le 29 Avr 2018*

<http://carnet.dordognelibre.fr/deces/laura-vieillefond/53312809>

### Kondolencoj el Cleveland

Mi deziras esprimi miajn plej profundajn kondolencajn pensojn al Pierre kaj al la familianoj de Laŭra Vieillefond. Okaze de la eminenta laboro farita de S-ino Vieillefond por antaŭenigi la Esperanto-movadon, mia patro kaj mi havis la privilegion renkonti ambaŭ Pierre-n kaj Laŭra-n, kiam ili venis por viziti Cleveland-on, la urbo en kiu Laŭra naskiĝis. Mi kredas, ke estis en 1995. Laŭra daŭre havis la adreson de la domo, en kiu ŝi vivis en sia infanaĝo, kaj ni veturis al la kvartalo, sed malkovris, ke la domo estis detruita. Ili gastis en nia hejmo dum pluraj tagoj kaj ni veturis kun ili por vidi la Niagaran Akvofalaron. Niaj konversacioj kun ili evidentigis ilian zorgon pri la humanaj bezonoj de la mondo, kaj ilian kredon, ke dank' al komuna lingvo, Esperanto, eblas grave plibonigi la kvaliton de interkompreno inter malsamaj homoj. En la jaroj post nia renkonto kun Pierre kaj Laŭra en Cleveland, ni havis kelkajn pliajn okazojn renkonti ilin en Francio. Mia patro laŭde parolis pri Laŭra kaj alte taksis ŝian agadon por antaŭenigi la Esperanto-movadon en Francio. Mi certas, ke ĉiuj ŝiaj familianoj memoras Laŭra-n pro ŝiaj multaj kvalitoj kaj mi scias, ke vi havas multajn belegajn rememorojn, kiuj helpos vin elteni la tristecon de ŝia foriro. Ŝia memoro estu beno por ĉiuj. Kun plej varmaj pensoj kaj preĝoj. Ralph Raphael Simon (rraphael@aol.com)

*(Esperantigis Yannick)*

# Citoyenne d'ici et du monde

**PARCOURS Louisa**  
**a vu le siècle et porte**  
**le monde entier en elle**

Pas plus Foyenne que cette Américaine née à Cleveland, en 1917. Elle arrive à Sainte-Foy-la-Grande en 1925 avec sa mère. Dans son bagage, elle progresse rapidement et obtient son certificat d'études à 12 ans. Sur sa lancée, elle complète son cursus et décroche un poste de surveillante.

## Récréation

À partir de 1940, elle assure le remplacement des enseignants mobilisés. Sur le front de l'éducation, mais aussi sur celui des secours. Diplôme de secouriste en poche, elle est présente à l'hôpital en août 1994, lorsque le docteur Garrau obtient

des autorités allemandes que la ville soit épargnée. En 1945, elle se marie avec le Stade Foyen, plutôt avec l'un de ses rugbymen, Pierre Vieillefond, et revivait à ses amours de jeune fille : l'école Paul-Bert. De l'autre côté de l'estrade cette fois, elle enseigne, ouvre son cœur aux enfants en difficulté scolaire, et son esprit aux nouvelles pédagogies. Adeptes de la méthode Freynet, elle promeut à Sainte-Foy-la-Grande la première classe de perfectionnement. Sa retraite de l'éducation nationale en 1970 sonne le début d'une récréation toute en action.

Elle milite pour l'environnement, la paix, mais aussi la consommation bien ordonnée en créant l'antenne locale de l'association de consommateurs Que Choisir. En 1980, elle officialise ce que tous savent déjà - citoyenne du monde, parlant la langue du cœur - en de-

venant la présidente du club éspérantiste.

## Ville monde

Toutes les langues du monde mêlées... On comprend lorsque l'on sait. Son père, Julius Sapochnik originaire de Vilnius (Lituanie). Sa mère, Louisa Bellique, venue d'Iruun (Espagne). La rencontre à Paris. Le mariage à Cleveland, l'arrivée de Laura, avant l'installation de la famille dans la ville monde : New York. Également le dernier lien avec le père, resté pour toujours un papa d'Amérique, alors que Louisa, souffrante, choisit Sainte-Foy-la-Grande pour poser ses valises.

Pendant la guerre, Laura a échappé au pire départ, celui vers les camps de concentration. Elle a aujourd'hui 92 ans.

**Jean-Claude Faure**  
**et Ermanuelle Fère**



**Élève et enseignante à l'école Paul-Bert.** PHOTODISC

— S.O. 7.03.09



**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE »**

\* \* \* \* \*

**Centre Culturel Château Palmer**  
**33150 CENON**  
**Banque Postale:**  
**347771 F Bordeaux**



\* \* \* \* \*

**Prezidanto: Elvezio CANONICA**  
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315  
Avenue Sainte-Marie  
33400 TALENCE  
Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

**Sekretariino: Janine DUMOULIN**  
2, chemin des Nauves  
Chardes 17130 MONTENDRE  
Tel: 05 46 49 45 18 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

**Kasistino: Morine STRIDE**  
17 rue Voltaire  
33670 CREON  
Tel: 06 10 07 08 58 / [morinestride@gmail.com](mailto:morinestride@gmail.com)

\* \* \* \* \*

**Materialon por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)**  
**aŭ al [yannickdum@free.fr](mailto:yannickdum@free.fr)**

